Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 15 Aŭgusto 2026



# VENTO

## Veksilologia revuo en esperanto

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: vento@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

ENHAVO Paĝo


Flagoj de efemeraj ŝtatoj...kiam veksilologio urĝas. 3
Kongo (Demokratia Respubliko): flago kaj historio. 13
La flago de la Plano Annan por Kipro. 16
La fotografaĵo de niaj legantoj. 19
Litovio: de Mezepoko ĝis nun. 20
Skizo por onta veksilologia vortaro. 22
La flagoj de Sekretaj Servoj ( I ). 23
Lastaj informoj pri flagoj. 27
Lerneja prezentado pri veksilologio. 29
Vertikala pendumado de la esperanto-flago. 33
Veksilologia kuriozaĵo: *La ĉemizo de la nacia futbal-selektitaro de Haitio en la Monda Pokalo de 2026.* 37
La angulo de la blazonoj: *Brunejo.* 39
Kunveno por la leĝa fondiĝo de VENTO. 40
Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *Japana enmigrado en Brazilon.* 41
Trovu la eraron! 42
Veksilologia Humuro 43


Kunlaboris ĉi-numere: Cristina Bollini, Alejandro Burgos Escalante, Pietro Colombari, José María Salguero (Kani) kaj José María Rodríguez (red.).

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# Flagoj de efemeraj ŝtatoj... kiam veksilologio urĝis.

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

Efemeraj ŝtatoj kutime naskiĝis el fendoj de grandaj krizoj, imperiaj kolapsoj aŭ abruptaj sociaj revolucioj, kiam manko de potenca imperio faciligas al komunumoj, frakcioj aŭ ideologioj proklami sian sendependencon antaŭ ol nova regno sukcesas dispremi ilin.

Efemeraj ŝtatoj kaj flagoj subtenas urĝan kaj simbolan rilaton. Tiel, por mallongdaŭra politika ento, flago ne estas nur peco de tolo, male ĝi estas videbla nasko-atesto kaj la plej rapida ilo por postuli suverenecon kaj legitimadon antaŭ la mondo.

Ofte, des pli efemera estas la sendependa vivo de tiu teritorio ju pli ŝarĝita je signifo estas ties flagoj. Tiel, ili deziras densigi en koloroj kaj formoj la identecon de ŝtato, kiun la tempo minacas forviŝi.

Kompreneble, ĉi tiuj paĝoj ne pretendas listigi ĉiujn efemerajn ŝtatojn, kiuj ekzistis laŭlonge de la Historio, kelkaj el ili eĉ ekzistis nur dum kelkaj minutoj. Do, ni prezentos kelkajn el ili, kune kun la flago uzita en sia mallongdaŭra sendependo.

- **Respubliko de Bouillon.**

La Respubliko de Bouillon estis efemera ŝtato, sukcedanto de la samnoma duklando, ĝi ekzistis de la monato aprilo 1794 ĝis oktobro 1795 inter Francio kaj Belgio. Temis pri satelita ŝtato kreita de la unua franca respubliko. Tuj post la triumfo de la franca revolucio, la armeo okupis la duklandon, tie ne troviĝis la duko, kiu reale loĝis en Parizo. Do, oni proklamis sur la teritorio respublikon kiu daŭris nur unu jaron. En oktobro 1795 Francio aneksis la duklandon. Nuntempe ĝi estas belga teritorio.



*Pro la fakto, ke la Duk-lando de Bouillon troviĝis sub aŭstria suvereneco, la flago de la efemera respubliko estis tute simila al la aŭstria flago.*

## • Sedang-Reĝlando.

Marie-Charles David de Mayrena (1842-1890) estis franca eks-oficiro kaj aventuristo. Li edziĝis al vjetnamino kaj li parolis perfekte la vjetnaman lingvon. En la jaro 1888 la franca registaro organizis ekspedicion, sub la estro de Mayrena, en vjetnaman regionon, kie franca regado ankoraŭ ne estis efektiva.

Kiam Mayrena alvenis en la regionon, li konvikis la tieajn indiĝenajn reĝojn por organizi federacion, la reĝlandon Sedang, tie li fariĝis la reĝo Marie la 1-a. Li redaktis propran konstitucion en la nova ĉefurbo Kon Tum kaj eĉ poŝtmarkoj estis eldonataj.

La reĝo kontaktis kun la francaj aŭtoritatuloj por aranĝi francan protektoraton sur la nova reĝlando, tamen ili rifuzis. Tiam, li vojaĝis en Hongkongon por prezenti saman peton al britaj aŭtoritatuloj, kiuj respondis nee al tiu peto. En novembro 1889 franca armeo sendis novan ekspedicion, kiu metis finan punkton al tiu efemera reĝlando, kiu ekzistis nur de junio 1888 ĝis novembro 1889.



*La flago de la Sedang-reĝlando prezentas neniun aŭtoktonan simbolon de la vjetnamaj regionoj, kie ĝi fondiĝis. Do, ĝi devas esti komprenata vere kiel propra simbolo de la reĝo, pro la fakto, ke sur ĝi aperis vere okcident-kulturajn elementojn.*

## • Reĝlando Araŭkana kaj Patagona.

Denove temas pri reĝolando fondita de aventuristo. Orélie Antoine de Tounens estis juristo en la urbo Périgueux (Francio). Li defendis la ideon, ke la sudamerikaj regionoj Araŭkanio kaj Patagonio troviĝis sub la suvereneco nek de Argentino nek de Ĉilio, do ili povus proklami sian sendependiĝon. Tiam, li vojaĝis en tiujn regionojn, tie li kontaktis kun tribestroj de la mapuĉaj indiĝenoj. Ekzistas neniu pruvo pri la akcepto de la mapuĉoj proklami propran regno-landon kaj nomi la aventuriston Tounens kiel reĝon.

Tounens estis arestita komence de la jaro 1862 de la ĉiliaj aŭtoritatuloj, enkarcerigita kaj konsiderita kiel frenezulo, do li estis tuj liberigita. Li klopodis reveni trifoje en la sudamerikajn regionojn, tamen li ĉiam estis arestita kaj tuj elpelita. Do, la reĝlando de Araŭkanio kaj Patagonio estis efemera ŝtato de novembro 1860 ĝis januaro de 1862. Kiel kuriozaĵo indas diri, ke nuntempe ekzistas sukcedo-linio de Tounens, aspirantaj okupi iam la tronon.



La blua koloro de la reĝolando fondita de Tounens en Sudameriko reprezentas la ĉielon kaj la Pacifikan Oceanon. La blanka koloro la pacon ekzistantan inter la popoloj de la reĝlando kaj fine, la verda koloro simbolas la arbarojn kaj la valojn de la landoj.

## • Bas-Kanada Respubliko.


En la jaro 1791 la Kebeka kolonio dividiĝis en du provincojn: Bas-Kanado por francaj devenantoj kaj Alt-Kanado por britaj koloniistoj. Francoj esperis disponi pri propra teritorio kun sufiĉa aŭtonomio por decidi pri siaj propraj aferoj, tamen tio ne realiĝis kaj vere Bas-Kanado estis regata de brita gubernatoro. Tiel, en la jaro 1837 franc-devenantaj patriotoj ribeliĝis kontraŭ la britaj aŭtoritatuloj. En februaro 1838 oni proklamis la respublikon de Bas-Kanado, kiu rifuzis la britan povon. Tamen la forto de la brita armeo kaj la deklarita neŭtraleco de Usono faciligis la militan sufokon de la ĵusa republiko en novembro de tiu sama jaro.



Kvankam ne ekzistas certigita klarigo pri la signifo de la flago, laŭdire ĝi devenas de la franca revolucia trikolora flago, tamen kun horizontalaj strioj. La tri koloroj reprezentas la popolojn loĝantajn en la teritorio: irlandanoj, verda koloro; francoj, blanka kaj fine britoj, ruĝa koloro.

### • Respubliko de Akro.

En la monato julio de 1899, la hispana aventuriisto Luis Gálvez Rodríguez de Arias, apogita de la aŭtoritatuloj de la brazila subŝtato Amazonio, proklamis la Respublikon de Akro. Temis pri teritorio meze de la amazona praarbaro, pri kies suvereneco disputis Brazilo kaj Bolivio. Tie, Gálvez kreis ŝtaton por 13.000 enloĝantoj, kun ministerioj, lernejoj, hospitalo kaj eĉ malgranda armeo, eĉ poŝtmarkoj estis emisiitaj. Nova prezidanto, Antônio de Sousa Braga forpelis la unuan estron de la respublikon, kvankam Gálvez poste denove okupis la prezidantecon. En la monato marto de 1900 la bolivia armeo okupis la urbon Puerto Alonso kaj la efemera respubliko finiĝis. Ĉiuj aŭtoritatuloj de la Respubliko fuĝis en Brazilon. Post akordo subskribita en la jaro 1903 inter Brazilo kaj Bolivio, la teritorio de la eksa Respubliko de Akro estis aĉetita de Brazilo kontraŭ 2 milionoj da britaj pundoj.



La originala flago de la Respubliko estis dezajnita de Luis Gálvez mem. Sur ĝi aperas la koloroj de la brazila flago. Hodiaŭ Akro estas subŝtato de la Brazila Respubliko, kaj en la jaro 1963 oni decidis uzi similan flagon al tiu de la efemera respubliko.



*Flago de la nuntema brazila subŝtato Akro.*

## • Transkaŭkaza Federacia Demokratia Respubliko.

Post la rusa revolucio de la monato februaro 1917, la provizora registaro establis specialan komitaton por Transkaŭkazio. Parlamentanoj de tiuj regionoj renkontiĝis en la urbo Tbiliso en februaro 1918 kaj, post elekto de prezidanto, en aprilo de tiu jaro oni proklamis la sendependiĝon de Transkaŭkazio. Tamen, la ĵus naskita ŝtato estis formita de tri malsimilaj popoloj: kartveloj, armenoj kaj azerioj, kaj fine la naciaj interesoj de ĉiu popolo fariĝis pli gravaj ol tiuj de la komuna respubliko. Tiel, en la monato majo tiuj popoloj siafoje proklamis siajn proprajn sendependiĝojn kaj la Transkaŭkaza Respubliko ĉesis ekzisti en la monato majo 1918.




Pro la mallonga daŭro de la respubliko vere ties flago ne estis sufiĉe diskonigita, eĉ oni asertas, ke ĝi neniam oficialiĝis. Pro tio, ne ekzistas ne-dubitebla versio de la signifo de strioj kaj koloroj. Tamen, kelkaj fakuloj asertas, ke la oranĝa koloro, ne flava, signifas la unuiĝon de la tri popoloj. La nigra koloro simbolas la tiutempajn malfacilajn jarojn travivitajn kaj fine la ruĝa koloro estas la sango de la herooj de tiuj popoloj.

## • Respubliko de la Tuloj.

La tulaj triboj en Panamo ĝuis aŭtonoman reĝimon, kiam la teritorio estis parto de Kolombio. Kiam Panamo sendependiĝis en la jaro 1903 la novaj aŭtoritatuloj nuligis tiun favoran reĝimon kaj devigis la indiĝenojn sekvi okcidentajn kutimojn. Tio okazigis gravajn problemojn laŭlonge de la sekvantaj jaroj. En februaro 1925 okazis renkontiĝo de la tula-tribestroj. Tiam, ili decidis proklami la respublikon de la Tuloj. Kelkaj panamaj polic-stacioj estis atakitaj, tiu ribelo okazigis dudekon da mortintoj.

En marto de tiu jaro 1925 la panamaj aŭtoritatuloj subskribis pac-akordon kun la indiĝenaj tribestroj, kun la atesto de usona ministro. Laŭ tiu


akordo oni nuligis la sendependiĝon kaj la panama registaro devontigis respekti la kutimojn de la tula popolo. Do, temis pri respubliko ekzistanta de februaro ĝis marto 1925.



La dezajno de la flago apartenas al nepino de unu el la tribestroj. La standardo baziĝas sur la hispana flago kaj meze de ĝi aperas svastika kruco. Svastiko estis antikva simbolo de la tula kulturo, ĝi reale reprezentas kalmaron, kiu estas mita besto por la tuloj.

## • Orient-Karelia Respubliko.

En la monato marto 1919 finnaj naciistoj, kontraŭaj al ĵus naskita sovetia reĝimo en Rusio, proklamis la sendependecon de Orienta Karelio, kun ĉefurbo en Kalevalo. Parlamento estis kunvokita kaj la unua registaro nomumita. En majo de tiu sama jaro, 1919, la ruĝa sovetia armeo okupis la ĵus naskiĝitan respublikon kaj la registaro fuĝis en Finnlandon. Fondiĝis tiam la Karelia Aŭtonoma Socialisma Soveta Respubliko, kiu anstataŭis tiun efemeran antaŭan respublikon.



La flago de ĉi tiu efemera respubliko estis kreita de la finna pentristo Akseli Gallen-Kallela. La baza dezajno reprezentas la skandinavan krucon. La verda koloro reprezentas la vastajn arbarojn de la regiono. La nigra koloro estas la simbolo de la suferanta historio de la karelia popolo kaj fine la ruĝa koloro reprezentas la sangon verŝitan cele la liberecon.

## • Orient-Turkestana Islama Respubliko.

En la jaro 1933 la ĉinaj aŭtoritatuloj nuligis la aŭtonoman reĝimon de la Ujgura popolo, okcidente de Ĉinio. En novembro de tiu jaro okazis ribelo de ĉi tiu etna malplimulto, kaj stariĝis tiam unu el la unuaj islamaj respublikoj en la mondo kun la nomo Orient-Turkestana Islama Respubliko. Reprezentantoj de la nova ŝtato vojaĝis en kelkajn najbarajn ŝtatojn, cele la atingon de diplomatia agnosko. En kelkaj landoj, ekzemple en Afganio, la nova respubliko estis bone akceptata, tamen neniu havigis al ili armilojn kaj helpon. Fine, en la monato aprilo de 1934, islamanoj kunligitaj kun la ĉina registaro, prirabis la turkestanan ĉefurbon kaj la efemera Orient-Turkestana Respubliko malaperis.



La Orient-Turkestana Respubliko naskiĝis sub la influo de la turka politika kaj kultura movado, do, la flago de la efemera respubliko sekvas la modelon de la turka flago. Ĉi-kaze la ruĝa koloro estas anstataŭigita de helblua koloro, simbolo de la ĉielo.

## • Libera Ŝtato de Fiumo.

Post la Unua Mond-Milito la urbo Rijeko, *Fiume* en la itala lingvo, fariĝis regiono disputita de la Itala Reĝlando kaj la ĵus naskiĝita Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj. En la jaro 1919 la urbo estis konkerita de itala armeo estrita de la poeto kaj militisto Gabriele D'Annunzio. Post la konkero li proklamis la Liberan Ŝtaton de Fiumo, kiu estis unuamomente agnoskita de Italio kaj la Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj. Poste eĉ Francio, Usono kaj Britio akceptis la sendependiĝon de la urbo.

Post la konkero de la itala registaro fare de la faŝistoj de Mussolini, la urbo Fiumo estis okupita de italaj trupoj kaj du jarojn poste, la urbo estis aneksita al Italio. Tiam malaperis la efemera libera ŝtato.



La flago de la Libera Ŝtato de Fiumo uzis la tradiciajn kolorojn de la fiuma heraldika blazono dum la tempo kiam la urbo estis parto de la Aŭstria-Hungaria Imperio.

## • Ŝtato Katango.

Kiam en julio de 1960 estis elektata Patrice Lumumba kiel ĉefministro de la Demokratia Respubliko Kongo, la prezidanto de regionisma partio de la provinco Katango, Moisés Tshombe, deklaris la sendependencon de la provinco. La prezidanto Lumumba petis  helpon al Sovet-Unio por eviti la secesion de tiu provinco, komenciĝis tiam, milito inter la armeo de la Respubliko Kongo kaj tiu de Katango. Dum la luktoj okazis kruelaj etnaj amasmurdoj. Tio provokis la intervenon de Unuiĝintaj Nacioj, kies trupoj eniris en Élisabethville (hodiaŭ Lumumbaŝo), la katanga ĉefurbo, en januaro 1963. En tiu sama monato la sendependiĝo de la provinco estis nuligita.



La flago de Katango estis dezajnata de la belga arkitekto Louis Dressen. La standardo bildigas la oficialan moton de la Ŝtato: *Forto, Espero, kaj Paco ene de Prospero.* Tiel la ruĝa koloro reprezentas la forton; la verda estas la

simbolo de la espero kaj la blanka koloro signifas pacon. Aperas ankaŭ tri malgrandaj krucoj, ne temas pri religia simbolo, male ili reprezentas tradician interŝanĝilon, uzitan tradicie de katanganoj kiel moneron. Do, ĝi aludas la prosperon laŭ la moto de Katango.

**• Respubliko Angvilo.**

Angvilo estas malgranda insulo en la Kariba Maro. Ĝi estis koloniigita en la 17-a jarcento de Britio. En februaro de 1967 Britio decidis koncedi aŭtonoman reĝimon al la insuloj Sankta-Kito, Neviso kaj Angvilo. Angvilanoj tute rifuzis la proponon, pro la fakto, ke la reala administrejo troviĝis en la insulo Sankta-Kito, pro tio la insulo Angvilo restus tute forlasita. En la monato majo 1967 angvilanoj kaj la londona metropolo debatis pri la afero. Ili ne estis kontraŭaj al la brita koloniigo, tamen oni rifuzis la dependon de la kolonio Sankta-Kito kaj Neviso. Neniun definitivan solvon oni atingis, tiel en julio 1967 okazis referendumo, tiam venkis tiuj, kiuj preferis disiĝi el la komunumo kreita kun Sankta-Kito kaj Neviso. Komenciĝis tiam diskutoj kun la metropolaj aŭtoritatuloj.

Dum du jaroj tiuj diskutoj faciligis neniun solvon. Do, en februraro 1969 okazis nova referendumo, tiam oni demandis al loĝantaro decidi pri ebla sendependiĝo de la insulo Angvilo. La rezulto estis tute favora al la sendependeco, tiam oni proklamis la Respublikon Angvilon. Oni emisiis proprajn monerojn kaj oni petis la diplomatian agnoskon al Usono, kiu rifuzis tiun proponon. Post tiu deklaro la brita metropolo sendis soldatojn en la insulon. La invado estis tute pacema, pro la fakto, ke neniu luktis en la insulo, la angvilanoj eĉ havigis glasojn da teo al invadantoj! Malaperis tiam la respubliko Angvila, kiu ekzistis nur dum unu monato. La fina rezulto de la historio estis favora al Angvilo, kiu post la sendependiĝo de Sankta-Kito kaj Neviso, restis kiel kolonio ekstera al tiu teritorio.



En septembro 1967, Marvin Oberman kaj Lydia Gumbs dezajnis la *"flagon de la tri delfenoj"*, kiu estis tre bone akceptita de la angvilanoj kiel simbolo de la sendependiĝo. La blanka koloro reprezentas la pacon kaj la helblua strio estas la simbolo de la juneco de la respubliko. La tri delfenoj en la centra parto de la flago reprezentas la persistecon, la unuecon kaj la forton, kiuj formas kontinuan kaj senfinan cirklon.

## • Respubliko Biafro.

Niĝerio sendependiĝis en la jaro 1960. La nova respubliko havis vastan teritorion kun tri grandaj etnaj grupoj, inter ili la igboj.  Post kelkaj puĉoj en la lando, okazis teruraj amas-murdoj kontraŭ tiu etno. Pro la ne-kapableco protekti tiun popolon, militestro en tiu regiono proklamis la sendependiĝon de la igba popolo en la nova Respubliko Biafro. La centra Niĝeria registaro ne povis akcepti tiun secesion, pro la fakto, ke la plej grandaj ekonomiaj rimedoj de Niĝerio, ĉefe petrol-putoj, troviĝis en tiu regiono.

Do, komenciĝis interna milito inter Niĝerio kaj la nova Respubliko Biafro. Post 3 jaroj da kombatoj, pli ol unu miliono da viktimoj, kaj kun nula diplomatia agnosko favore al Biafro, fine la igbaj militistoj kapitulacis. Tiel en januaro 1970, Biafro ĉesis ekzisti kiel sendependa ŝtato.



Sur la flago la ruĝa koloro reprezentas la sangon verŝitan dum la lukto; la nigra koloro memorigas la doloron pro la herooj mortintaj kaj ankaŭ la afrikan kontinenton; la verda koloro simbolas la riĉecon de la respubliko kaj la esperon. Meze de la centra strio videblas leviĝanta suno, reprezentante la naskiĝon de nova ŝtato. El la suno eliras 11 radioj, kiuj memorigas la 11 provincojn de Biafro.

Kompreneble,  ne nur ĉi tiuj estis la solaj efemeraj ŝtatoj iam ekzistantaj. Verdire centoj da ili estas troveblaj laŭlonge de Historio, tamen jen ekzemploj pri ĉi tiaj ŝtatoj, kiuj ĝuste en ties komenco bezonis ion tiel gravan por sia sendependiĝo, kiel flagon.

# Kongo (Demokratia Respubliko): flagoj kaj historio

✍ *Cristina Bollini (Italio)*


Demokratia Respubliko Kongo (DRKongo), ĝis la jaro 1997 nomata Zairio, estas unu el la plej grandaj landoj de la Centra Afriko kaj estas riĉa je mineralaj rimedoj. Ĝia historio komenciĝas kiam al tiea loĝantaro (ĉefe ĉasistoj kaj pigmeaj kolektistoj) aliĝis, ekde la unua jarmilo p.K, la bantuaj popoloj, kiuj enkondukis agrikulturon kaj bredadon. En la nuna Konga teritorio sinsekvis multnombraj kaj gravaj lokaj reĝoj, kiuj disvolvis komercajn rilatojn kun la unuaj portugaloj kiuj atingis ĉi tiujn teritoriojn fine de la 11-a jarcento.

La sklavkomerco kaj la rivaleco inter diversaj afrikaj reĝolandoj, kaŭzis ilian dekadencon, ĝis kiam, dum la 19-a jarcento, ĉi tiu teritorio fariĝis propraĵo de la Belga Reĝo Leopoldo la 2-a, kiu nomis ĝin "Libera Ŝtato de Kongo". Tiam, oni ektrouzis kaj la loĝantaron kaj la mineralajn rimedojn ĝis la jaro 1908, kiam Belgio prenis la administradon de la teritorio kaj ŝanĝiĝis la nomo de la lando, kiu post tiam nomiĝis Kongo-Belga.


En junio de 1960 la lando akiris sendependecon kaj alfrontis longan ekonomian kaj socian krizojn, kies kulmino estis la puĉo en la jaro 1970 de generalo Mobuto, kiu ŝanĝis la nomon de la lando al Zairio. En 1997 la ribela movado gvidata de Laŭrento Désiré Kabila estigis la "Demokratian Respublikon Kongo", implikitan, ĝis la jaro 2003, en unu el la plej longaj kaj sangaj militoj, kiuj kaŭzis milionojn da mortintoj. Ekde 2003 la Respubliko Kongo trairas malfacilan periodon de malstabileco kaj koruptado, kaŭzatan de la administrado de la kupraj, koltanaj kaj kobaltaj minejoj, kemiaj elementoj nepraj por la nuntempa industrio.

Videble flagoj disvolviĝis laŭ la malfacila historio de la lando.

Ekde 1877 ĝis 1960 flago estis blua kaj centre aperis flava stelo, kiu reprezentas la "lumon", kiun Eŭropo alvenigis en Afrikon. Ekde 1960 ĝis 1963 estis aldonitaj, maldekstre, ses malgrandaj steloj, simbolantaj la provincojn de la nova lando.



*Flago de "Belga Kongo"*
*1877-1960*



*Flago de "Respubliko Kongo"*
*1960-1963 kaj denove inter*
*1997-2006.*

Ekde 1963 ĝis 1971 oni ŝanĝis la desegnon: sur blua fono aperis flava stelo kaj ruĝa bendo, borderita per flavo (aŭ oro), tre simila al la nuna flago.



*Flago de la Demokratia Respubliko Kongo*
*1963 - 1971*

Mobuto Sese Seko en la jaro 1971 kaj ĝis la kapitulaco de sia registaro, uzis verdan flagon kun, centre, flava disko, ene de kiu, mano tenas bruligantan torĉon, simbolo de "la afrika aŭtentikeco" de sia reĝimo.



*Flago de Mobuto Sese Seko. Inter 1971 kaj 1997 dum periodo de militista reĝimo, kiam la ŝtato adoptis la nomon "Zairio"*

Demokratia reĝimo revenis en la landon de 1997 ĝis 2006. Tiam ankaŭ revenis la flago de la jaro 1960, tiu uzita post la sendependiĝo. En februaro de 2006, oni aprobis la novan flago de la Respubliko: ĉiela lazura fono kun, maldekstre, flava stelo, kaj ruĝa bendo borderita per flavo, kiu tre similas al la flago de 1997. La koloroj simbolas pacon (bluan), la sinoferon de la popolo (ruĝan), la riĉecojn de la lando kaj la prosperecon (flavan); stelo reprezentas unuecon kaj estontecon.



*Flago de la Demokratia Respubliko Kongo, oficiale adoptita la 18-an de februaro 2006. Simila al tiu de 1963 kun malsamaj proporcioj kaj pli milda blua nuanco.*

La artikolo 1-a de la Konstitucio de la Demokratia Respubliko Kongo fiksas:

• nacia emblemo estas la *"drapeau bleu ciel"* (ĉiellazura flago) kun flava stelo kaj ruĝa bendo borderita per flavo;

• *"armoiries"* (la ŝtata blazono) estas leoparda kapo flankigita de dentego de elefanto kaj lanco.


## La ŝtata blazono




La leoparda kapo, frunte desegnata kaj kun larĝe malfermitaj faŭkoj, estas tradicia simbolo de la tribestroj, uzata dum la regado de Mobuto kiel simbolo de forto, kuraĝo kaj aŭtoritato. La dentego de elefanto, iom kurba, kvazaŭ ĉirkaŭante leopardan kapon, simbolas la faŭnon de la lando kaj la naturajn rimedojn. Lanco, supren direktita, reprezentas la defendon de la patrujo kaj de la akirita sendependeco. Ĉiuj elementoj de la blazono baziĝas sur roko, simbolo de stabilecon kaj de la solidaj fundamentoj de la Respubliko. Sur ruĝa kartuso, en la franca lingvo, estas skribita la nacia devizo *"Justice – Paix – Travail"* ("Justeco – Paco – Laboro").

# La flago de la Plano Annan por Kipro

*Lukas Toczki*



Kofi Annan
1938 - 2018

En la jaro 2002, la tiama ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Kofi Annan prezentis la unuan version de agad-plano, kies ĉefa celo estis solvi la longan kaj malfacilan konflikton de Kipro kaj atingi la reunuiĝon de la insulo, dividita en du partojn depost la turka armea interveno de la jaro 1974. Por kontentigi ambaŭ komunumojn, grekoj kaj turkoj, Annan devis modifi eĉ kvin-foje sian unuan planon, ĝis la atingo de definitiva versio en marto 2004. La "Plano Annan por Kipro" estis prezentita en Svisio, kaj laŭ postulo de la plano mem, ĝi devus esti aprobita post referendumo de ambaŭ komunumoj.

La projekto proponis transformi la landon en novan ŝtaton, eĉ kun nova nomo: Unuiĝinta Respubliko de Kipro, strukturita sub du-komunumoj kaj zonoj. Por ambaŭ komunumoj ekzistus federacia strukturo komisiita pri komunaj aferoj, ekz. ekstera politiko kaj valuto. Tamen, ĉiu komunumo, la turka kaj la greka, havus proprajn administraciojn. Krome, kompleksa sistemo de rotacia prezidanteco kaj nomumo de juĝistoj de supera kortumo, garantius, ke neniu el tiuj du komunumoj povus regi la alian. Fine, kelkaj zonoj devus elteni teritoriajn ĝustigojn, por permesi la limigitan revenon de delokitoj al iliaj devenlokoj.



Kipra Respubliko



Turka Respubliko Norda Kipro

La projekto mem postulis por sia ekrealigado la aprobon per referendumo de ambaŭ komunumoj. Turk-kipranoj voĉdonis pore, proksimume la 65%. Ĉi tiu komunumo komprenis, ke la plano reprezentis taŭgan solvon por finigi ĝian internacian izolecon kaj eĉ por faciligi la aliĝon al Eŭropa Unio.

Tamen, grek-kipranoj voĉdonis kontraŭ la proponon, ĉirkaŭ 76%. Ili konsideris, le la plano troe favoris la interesojn de Turkio, ĉar oni permesis ke trupoj de Turkio kaj Grekio konservu konstantan ĉeeston sur la insulo. Tio estis tute ne-akceptebla por la grek-kipranoj, kiuj opiniis, ke la turka armeo invadis la insulon en 1974 kaj ili devis forlasi komplete la insulon. Krome, grek-kipranoj argumentis, ke la ekonomia kosto de la rekonstruado estus maljusta rilate iliajn interesojn

Pro la fakto, ke la aprobo de ambaŭ komunumoj estis nepra, laŭ postulo de la propa plano, ĝi definitive restis forgesita. Kelkajn tagojn poste, la 11-an de majo 2004, la Respubliko de Kipro oficiale aliĝis al la Eŭropa Unio, kvankam el praktika vidpunkto, en la nordo de la insulo, tio estas la turka parto, la normoj de EU ne estas aplikitaj.

La plano de Annan ankaŭ proponis novan flagon por la Federacio. Cele al tio Unuiĝintaj Nacioj diskonigis konkurson, oni ricevis pli ol mil proponojn. Laŭ la plano la projekto devus esti akceptita de reprezentantoj de ambaŭ komunumoj, kaj se fine tiu akordo ne estis ebla, Kofi Annan mem elektus la flagon. Fine la  projekto elektita estis jena.



Propono de Kofi Annan por la
Unuiĝinta Respubliko de Kipro.

La blua strio reprezentas la grekan komunumon; la ruĝa strio estas la simbolo de la turka komunumo. La maldikaj blankaj strioj montras la pacan kunvivadon inter ambaŭ grupoj. Meze troviĝas flav-oranĝa pli larga strio, ĝi reprezentas la historian nomon de la insulo Kipro, kiu devenas el kupro.

Estas necese elstari malsimilaĵon kun la flago de Kipro. Tiam, en la jaro 1960 kiam ĝi estis adoptita, sur la kipra flago estis evitendaj la blua kaj la ruĝa koloroj, pro la fakto, ke oni ne devis montri la dividon inter du komunumoj. Tamen, sur la flago aprobita de la plano Annan, la apero de ambaŭ koloroj estis nepra.

Fine, la plano Annan por unuigita insulo Kipro estis forlasita, do, la flago pripensata en tiu projekto neniam flirtis.

**Verkoj de Cristina Bollini pri Heraldiko kaj Veksilologio.**

**Troveblaj ĉe Amazon**




ISBN: 979-1224009344

68 paĝoj




ISBN: 979-1221411607

268 paĝoj

# La fotografaĵo de niaj legantoj



Flago de la urbo Don Benito, provinco Badaĥozo (Hispanio)
Junio, 2026
Fotis: J.M. Salguero

*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

# Litovio: de Mezepoko ĝis nun

*Cristina Bollini*

Historio rakontas ke, dum la 13-a jarcento, la antikvaj baltaj triboj, unuiĝis sub la gvidado de Mindaugas; poste, dum la Mezepoko, la Ĉefduka Regno de Litovio fariĝis eŭropa potenco, etendante sian regadon sur vastaj orientaj teritorioj. Litovio, en la jaro 1569, kunigis kun Pollando, sed, fine de la 18-a jarcento, litoviaj teritorioj transiris al la Rusa Imperio, sub la carisma regado, kiun lokaj loĝantaroj malbone toleris.

Post la Unua Mondmilito Litovio akiris sendependecon, kiu estis baldaŭ interrompita de sovetiaj kaj naziaj okupadoj dum la Dua Mondmilito, antaŭ ol reveni, en la jaro 1944, sub sovetian regadon. En 1990, Litovio estis la unua sovetia respubliko, kiu deklaris sian sendependecon, tiel revenante al la uzado de la flago de 1918.



*Flago uzata de la Ĉefduka Regno de Litovio ĝis la jaro 1795.Ĝi prezentas la antikvan blazonon de Kavaliro; ŝildo entenas la familian blazonon, kie la kruco rememoras la konvertiĝon al kristanismo de la familio je la fino de la 14-a jarcento.*

La nuna litova flago, oficiale adoptita la 20-an de marto 1989, kaj regata de la Leĝo I-497, laste sanĝita la 8-an de julio 2024, estas horizontala trikoloro flava-verda-ruĝa. Flava koloro reprezentas sunon, lumon kaj prosperecon; verda simbolas naturon, arbarojn kaj esperon, kaj tiu ruĝa estas, kiel sur aliaj flagoj, kuraĝo kaj la sango elverŝita por konkeri sendependecon. En 1917 grupo de artistoj kaj intelektuloj de la tiama epoko, elektis ĉi tiujn kolorojn, post la sendependiĝo de la Carista Rusio.



La flago estis unuafoje uzita en februaro 1918 sed, dum la sovetia periodo (1940-1990) estis anstataŭita per la ruĝa flago kun falĉilo kaj martelo (tradiciaj sovetiaj simboloj); poste ĝi estis oficiale reestablita kaj uzata ĝis hodiaŭ, fariĝante simbolo de nacia identeco, libereco kaj persistemo.




*Flago dum la sovetia periodo (1953-1898)*

Litovio havas nacian blazonon, de tre antikva deveno, la "*Vytis*" (la "Kavaliro de Litovio"). Blazono estas ruĝa sildo, sur kiu estas desegnata la "*Vytis*", armita kavaliro sur blanka ĉevalo, kiu manprenas glavon kaj albrakigas lazuran ŝildon kun ora kruco. La figuro de "*Vytis*" devenas de la Mezepoko (14-an jarcento) kaj estis la antikva simbolo de Ĉefduka Regno de Litovio; ĝi reprezentis forton kaj sendependecon de la ŝtato mem, kaj, verŝajne ĝuste pro tio, la uzado de *Vytis* estis malpermesita dum la sovetia periodo.

La blazono, kun armita kavaliro preta por batali, simbolas kuraĝon kaj defendon de la patrujo. La kuranta ĉevalo rememorigas moviĝon kaj liberecon, dum la kristana identeco de la nacio estas reprezentata per la kruco sur la ŝildo.

La ruĝa koloro de la fono reprezentas la historion de la lando kaj la sinoferon por la konkero de libereco, signifo kiun oni retrovas ankaŭ sur la flago.




*Nacia blazono de Litovio, kiu reprenas tiun, uzitan sur la flago de la Ĉefduka Regno.*

## SKIZO POR ONTA VEKSILOLOGIA VORTARO

Krucoj estas unu el la plej antikvaj elementoj aperantaj en flagoj. Jen iliaj nomoj en esperanto, laŭ formo kaj lokigo ene de la flago.



HEROLDA KRUCO
La kruco tuŝas la randon de flago.



LIBERA KRUCO
La kruco ne tuŝas la randon de flago.



HEROLDA ŜOVITA KRUCO
La kruco tuŝas la randon de flago, tamen ĝi ne aperas tute centrigita.



ANDREA KRUCO



PRIHAKITA ANDREA KRUCO

# LA FLAGOJ DE SEKRETAJ SERVOJ *(I)*

Preskaŭ ĉiuj landoj havas sekretan servon, kies celo estas kolekti informojn kaj protekti la propran landon kontraŭ diversaj minacoj, jen internaj, jen eksteraj. Sed tiuj servoj ne nur havas proprajn organizojn kaj sigelojn, sed foje ankaŭ flagojn. En ĉi tiu unua artikolo dediĉitaj al la sekretaj servoj, ni esploros la flagojn de la sekretaj servoj de Hispanujo, Israelo kaj Usono.

**HISPANUJO**

CNI (Centro Nacional de Inteligencia/Nacia Informkolekta Agentejo). La flago de la sekretaj servoj de Hispanujo estas jena:




*Kreita de la aŭtoro surbaze de fotografioj.*

*Fonto: Julián Rojas (fotografiisto).*




Temas pri grizkolora aŭ arĝenta flago en kies centro troviĝas la blazono de la Agentejo. La teksto estas «España» (Hispanujo) kaj «Centro Nacional de Inteligencia» (Nacia Informkolekta Agentejo). Aldone, ene de ĝi troviĝas la oficiala blazono de Hispanujo. Laŭ la malmultaj ekzistantaj fotografioj, la flago havas la samajn proporciojn kiel la flago de Hispanujo, t.e. 2:3.

Jen unu el la malmultaj ekzistantaj fotografioj de ĉi tiu flago (notu, ke la fono de la blazono kongruas kun la koloro de la flago!):

**ISRAELO**

Mosado (המוסד למודיעין ולתפקידים מיוחדים Instituto por Informado kaj Specialaj Operacoj).




*Fonto: hebrelingva Vikipedio*

La flago de ĉi tiu Instituto estas blanka, koloro aperanta en la flago de Israelo kaj simbolanta la bonkorecon de Dio. Aldone, la flago enhavas la blazonon de la Instituto entenantan versiklon de la Tanaĥo:
«באין תחבולות יפול עם, ותשועה ברוב יועץ»
(Ĉe manko de prikonsiliĝo popolo pereas; sed ĉe multe da konsilantoj estas bonstato), Sentencoj de Salomono, 11:14 (traduko de la Majstro). La proporcioj estas la samaj kiel la flago de Israelo, t.e. 8:11. Laste, sed ne balaste la flago aperas kun blua frangô, kiu memorigas nin pri la deveno de la Mosado.



*La flago de la Mosado kun blua frangô.*
*Fonto: registaro de Israelo*

Jen fotografio de la flago de la Mosado (rimarku la turnitan pozicion de la blazono!):

**USONO**

CIA (Central Intelligence Agency/Centra Informkolekta Agentejo).




*Fonto: anglalingva Vikipedio*

La flago estas malhelblua flago, sur kies centro troviĝas la oficiala sigelo de la (fi)fama Agentejo. Laŭ la propra retpaĝo de la CIA, la sigelo enhavas plurajn simbolojn: aglon por atentemo, ŝildon por defendo kaj kompasan rozon por la kolektado de tutmondaj informoj. La sigelo estis kreita de la prezidanto Harry S. Truman per la Plenuma Ordo 10111. Ĝi enhavas la tekston «Central Intelligence Agency» (Centra Informkolekta Agentejo) kaj «United States of America» (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko). La flago de la Agentejo ĉiam enhavas flavan franĝon, kiu estas tipa ornamaĵo de flagoj en Usono. La proporcio de la flago estas la sama kiel tiu de la flago de Usono, t.e. 10:19.




*La flagoj de Usono kaj de la CIA, ambaŭ ornamitaj per flava franĝo.*
*Fonto: CIA.*

REFERENCOJ


• CIA (14-a de junio 2024). Ask Molly: IC flags. Central Intelligence Agency. https://www.cia.gov/stories/story/ask-molly-ic-flags/

• CIA (s.d.). CIA Memorial Wall. Central Intelligence Agency. https://www.cia.gov/legacy/headquarters/cia-memorial-wall/

• Oficejo de la Ĉefministro (16-a de majo 2024). La Oficejo de la Ĉefministro nome de la Instituto por Informado kaj Specialaj Operacoj. Registaro de Israelo. https://www.gov.il/he/pages/spoke-mossad060524

• Truman Library. (17-a de februaro 1950). Executive Order 10111: Establishing a seal for the Central Intelligence Agency. https://www.trumanlibrary.gov/library/executive-orders/10111/executive-order-10111


Verkis: Alejandro Burgos Escalante (alejandroabe@proton.me).

---

## *Ne forgesu noti en via agendo*

# Kunveno fondiĝo de VENTO
https://meet.google.com/egc-qznj-nsc




### Eŭropo kaj Afriko

- Lisbono: 16:00
- Londono: 16:00
- Madrido: 17:00
- Romo: 17:00
- Berlino: 17:00
- Varsovio: 17:00
- Ateno: 18:00
- Johanesburgo: 17:00
- Najrobio: 18:00

### Ameriko

- Losanĝeleso: 08:00
- Ĉikago: 10:00
- Novjorko: 11:00
- Montrealo: 11:00
- Meksikurbo: 09:00
- Limo: 10:00
- Braziljo: 12:00
- Bonaero: 12:00

### Azio kaj Oceanio

- Teherano: 19:30
- Delhio: 20:30
- Pekino: 23:00
- Seulo: 00:00 (Lundon, la 7-an)
- Tokio: 00:00 (Lundon, la 7-an)
- Sidnejo: 01:00 (Lundon, la 7-an)
- Velingtono: 03:00 (Lundon, la 7-an)

# Lastaj Informoj pri Flagoj




## Sen flagoj en la Eŭropa Konkurso de Sinkrona Naĝado

Ĵus okazis en Parizo la Eŭropa Konkurso de Sinkrona Naĝado. Vere en ĉi tiu sporto Rusio estas granda potenco, do iliaj sportistoj ofte atingas la unuajn premiojn. De antaŭ kelkaj jaroj, kaj pro diversaj kialoj, sportistoj de Rusio kaj Belrusio ne rajtas konkuri kun la nomo de iliaj ŝtatoj, ankaŭ ne iliaj naciaj flagoj estas flirtigitaj aŭ la nacia himno aŭskultata, kaze de venko. Do, en ĉi tiu eŭropa konkurso de sinkrona naĝado, la belrusaj sportistoj konkuris ene de teamo nomita *"Neŭtrala Teamo A"* kaj la rusaj ĉe la *"Neŭtrala Teamo B"*.

Verŝajne, pro la fakto ke rusaj sportistoj gajnus kelkajn orajn modelojn dum la konkurso, la organizantoj decidis hisi neniun flagon dum tiuj ceremonioj. Kiel omaĝo al ŝtato nur estus aŭskultata solene la himnon. Kaze de venko de rusa aŭ belrusa sportisto, la himno ludota estus tiu de la Eŭropa Federacio de Sinkrona Naĝado.


Ĉi tio okazis dum la ceremonioj por aljuĝi medalojn al venkintoj, tamen, okaze de la prezentado de la sportistoj antaŭ la konkuro, sur elektronika indikilo aperis la flagoj de la sportistoj. Kio okazis rilate rusajn kaj belrusajn sportistojn? Nu, laŭvide organizantoj flirtigis blankan flagon ene de la indikilo por anonci la partoprenon de tiuj sportistoj.



# Flagoj en la ceremonio antaŭ ĉiu matĉo dum la pasinta Monda Futbal-Pokalo

Dum la oficiala ceremonio tuj post la inaŭguro de la ĵus-okazinta Monda Futbal-Pokalo, kaj ankaŭ dum la postaj matĉoj, grupo de gejunuloj prenis sur la grundon la vere gigantajn flagojn de ĉiu ludanta nacia futbal-teamo, antaŭ la komenco de ĉiu matĉo. Tamen, kiam la teamo de Saŭd-Arabio ludis sian unuan matĉon, la arabiaj aŭtoritatuloj sciigis, ke la nacia flago ne povis tuŝi la grundon. Tio suldiĝas al la fakto, ke la Leĝo pri Nacia Flago de Saŭd-Arabio ordonas, ke la nacia flago devas tuŝi nek la plankon, nek la akvon, pro la fakto, ke ene de ĝi aperas esenca religia deklaro. Laŭdire la iraka futbal-federacio prezentis saman postulon, pro la fakto, ke ankaŭ sur la iraka flago aperas religia deklaro.

Depost tiam la Internacia Futbal-Federacio decidis teni la flagojn, sed stare, tio estas neniu flago, kun religia teksto aŭ ne, devus tuŝi la grundon.




***Ĉu vi ŝatas flagojn? Ne hezitu kaj partoprenu en la baldaŭa fondiĝo de la Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo (VENTO) !***

***Pliaj informoj pri la kunveno por fondi ĝin aperas sur la paĝo 40-a.***

***vento@esperanto.ac***


# Lerneja prezentado pri veksilologio

**Prieto Colombari** estas juna (12-jara) itala flag-amanto, ĉu li estas la plej juna veksilologisto? Eble jes. Li estas lernanto en la gimnazio de la urbo Milano. Tie, por lerneja ekzameno li prezentis etan tezon pri la temo "Veksilologio", kaj nun li rajtigis al ni aperigi sian laboron en esperanto por nia revuo. Multan dankon Pietro kaj gratulon por via intereso al veksilologio.









## FLAGO KIEL HISTORIO



W. SMITH 1958



VEXILLUM



ŜILDO

VEKSILOLOGIO



PRASTANDARDOJ

4000-3000 a.k
antaŭdinastia
periodo

VEXILLUM

Romia epoko





SILKO


Dinastio Zhou
1046-256 a.K.
Partha popolo
Batalo de Carre 53 a.K.

LABARO

333 p.K.
Kostantino



VEKSILOLOGIO



## FLAGO KIEL STILO

DE HERALDIKO ĜIS MODERNAJ FLAGOJ (19-a jarcento)

NAVA
(NORTH AMERICAN VEXILLOLOGICAL ASSOCIATION)

- 1 SIMPLA
- 2 SIGNIFOPLENAJ SIMBOLOJ
- 3 MALMULTAJ KOLOROJ
- 4 NENIA SKRIBRAĴO AŬ BLAZONO
- 5 ORIGINALECO


7-A JANUARO 1797
CISPADANA
RESPUBLIKO



KVIN TAGOJ DE MILANO



ARTIKOLO NR. 12
ITALA
KONSTITUCIO
ARTIKOLO 292 K.P.



## FLAGO KIEL INSPIRO

VEKSILOLOGIO






BLUA-RUĜA KOKARDO

LA MARKIZO DE LA FAYETTE

17-A DE JULIO, 1789
LUIZO LA 16-A

VEKSILOLOGIO



OCEANAJ FLAGOJ



TUTAFRIKAJ FLAGOJ



TUTARABAJ FLAGOJ



EKSCENTRAJ SKANDINAVAJ FLAGOJ

VEKSILOLOGIO

## FLAGO KIEL MESAĜO

REKONU LA DIFERENCOJN



Flago de "Pride" - "Fiereco"
- ses strioj
- supre ruĝa, malsupre violkolora
- reprezentas la LGBTQ movadon



Flago de "Paco"
- sep strioj
- supre violkolora, malsupre ruĝa
- reprezentas pacon






## FLAGO KIEL REGULO







VEKSILOLOGIO



JOLLY ROGER



BLANKA FLAGO

VEKSILOLOGIO

# FLAGOJ KIEL KOMUNECO





VEKSILOLOGIO

# "FLAG ANT FARM" YUKINORI YANAGI





# FLAGO KIEL KURIOZAĴO




DUONHISITA FLAGO



PINTA FLAGO



FLAGO SUR LUNO



LUIGEBLAJ FLAGOJ

Activar Win
Ve a Configura

# Vertikala pendumado de la esperanto-flago

Kvankam la plej naturala situo de flagoj estas lokigi ilin sur flagstangoj, ekzistas multaj situacioj, ekzemple interne de konstruaĵoj, en salonegoj, ĉe internaciaj foiroj aŭ por ornami fasadojn, en kiuj vertikala prezento estas tre ofta. Meti flagon vertikale ne devas esti simple turni la standardon 90 gradojn kaj pendumigi ĝin, male en multaj ŝtatoj ekzistas specifaj regularoj, ofte kodigitaj en leĝoj aŭ protokolaj normaroj, por certigi, ke la flago estu traktata kun la plej granda respekto kaj ne estu montrita malĝuste aŭ renverse.



*Granda E-flago vertikale pendumita, okaze de la inaŭguro de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz (Aŭstrio) - 2026*

Tamen, ĉi tiu normaro ne ekzistas en Esperantio, do okaze de ĉiu kongreso aŭ simpla renkontiĝo, organizantoj metas la flagon laŭ vertikala pozicio laŭ sia bontrovo. Pro la fakto, ke estus necese akordigi tiun montron de nia flago simile en ĉiuj kunvenoj, ni proponas jenajn normojn por pendumi vertikale la esperanto-flagon.

Unue, oni devas sciigi "oran regulon" rilate la vertikaligon de flago, tiu esperanta aŭ alia: la supra parto de flirtanta horizontala flago devas daŭre aperi sur la supra parto, se ĝi aperas vertikale.


Kiel apliki ĉi tiun regulon rilate la esperanto-flagon? Nu, la blanka kvadrato kun la verda stelo devas aperi supren, eĉ se la flago estas pendumita laŭ vertikala pozicio.

Dua afero: kie situi la blanka kantono? Ĉu dekstre aŭ maldestre laŭ la vido de la publiko? Cele al tio, ni sekvu la normojn de ŝtatoj, kies flagoj ankaŭ havas suprajn kantonojn lokigitajn maldekstren, jen kelkaj:

La *US Flag Code* (Kodo pri la Usona Flago) sciigas jenon pri la vertikaligo de ties nacia flago: *“Sur muro aŭ fenestro la blua kantono, kie aperas la steloj, devas aperi sur la maldekstra supra angulo, se vidata de spektanto. La strioj devas esti pendumitaj vertikale.”*

Siafoje, la Departemento de la Aŭstralia Premiero, pere de sia oficiala gvidlibro pri protokolo (*Australian Flags Booklet*), regulas detale la uzon de la nacia flago en vertikala pozicio. Tiel, *“sendepende de la pozicio de la nacia flago, ĉu horizontale ĉu vertikale, la kantono kie troviĝas la Union Jack* (brita flago) *devas aperi ĉiam supre je la maldekstra flanko, se vidata de observanto."*

Kaj se paroli pri plia ekzemplo, la malajza flago, konata kiel *Jalur Gemilang*, havas bluan kantonon je la supra maldekstra parto, se ĝi flirtas. La normo MS 1211 rilate al hisado kaj montrado de la nacia flago sciigas, ke *"se la flago aperas laŭ vertikala prezentado, la blua kantono enhavanta lunon kaj stelojn devas aperi ĝuste sur la supra maldekstra loko, se vidata de la publiko."*





*Usona, Aŭstralia kaj Malajzia flagoj vertikale pendumitaj laŭ iliaj respektivaj naciaj normoj.*

Do, jen la vertikala lokigo de tri flagoj kun supra maldekstra kantono, simile al emblemo de Esperanto. La normo de ĉiu lando sciigas, ke la kantono devas daŭre aperi sur la supra maldekstra parto de la flago, laŭ la vido de spektanto. Krome, oni devas averti, ke en veksilologio, kaj ĝenerale en ĉiuklasa protokolo, la dekstra parto, laŭ la pozicio de homo aŭ de objekto, estas la plej grava. Ĉi-maniere la supra kantono estas sur la dekstra parto, se vidata el la pozicio de la flago, do maldekstre se temas pri spektanto.

Do, akceptite ke okaze de la vertikaligo de la esperanta flago, la blanka kantono enhavanta verdan stelon devas troviĝi je la supra maldekstra parto de la flago eĉ kiam ĝi pendumas vertikale, tamen aperas nova demando: kiameniere lokigi la verdan flagon?

Por respondi jenan demandon, estas necese agnoski, ke preskaŭ ĉiuj E-flagoj, aŭ pli bone diri *"ĉiuj E-flagoj"* estas ellaboritaj por esti pendumitaj horizontale, do la unua respondo al tiu demando devas konsideri tiun nepraĵon, tio estas, E-flago, eĉ se ĝi aperas vertikale pendumita, ĝi estis ellaborita por flirti horizontale. Pro tio, se ni sekvas la normojn antaŭe viditajn en la kazoj de la usona, aŭstralia kaj malajza flagoj, la kantono ne ŝanĝiĝas kaj ĝi daŭre aperas sur la supra maldekstra parto, se vidata de spektanto. Ĉi-kaze la stelo ne ŝanĝas sian pozicion.






*Esperanto-flagoj horizontale kaj vertikale pendumitaj.*

Tamen, estas necese agnoski, ke se oni simple rotacias la E-flagon, la stelo ŝanĝis sian pozicion, laŭ la vido de spektanto. Ĉi tiu sama afero okazas rilate kelkajn naciajn flagojn, ni vidu kiamaniere la afero estas regulita rilate du konkretajn flagojn, tiu de Ĉilio, sur kies flago ankaŭ aperas kantono kun stelo, kaj Liĥtenŝtejno, kiu aperigas kronon, kvankam ne ene de kantono. Estas necese averti ankaŭ, ke aliaj similaj flagoj -se paroli pri kantono kaj interna stelo- al E-flago, kiel tiuj de Liberio aŭ Togo, ne havas aprobitajn normojn pri la vertikaligo de la nacia flago.

Nu, rilate la ĉilian flagon, la Suprema Dekreto n-ro 1534 unue ordonas, ke la blua kvadrato kun la stelo, se vertikale lokigita, devas daŭre aperi sur la supra maldekstra parto de la flago. Do, same kiel tiuj antaŭe viditaj. Sed rilate la

stelon, ĝi disponas jenon: *"Sendepende de la maniero pendumi la flagon, ĉu horizontale, ĉu vertikale, ĉu en flagstango, la stelo neniam devas esti klinita aŭ inversigita. Tiel, unu el la pintoj ĉiam devas signi la superan flankon de la blua stelo"*.

Kaj rilate la Liĥtenŝtejnan flagon, la Leĝo pri Blazonoj kaj Naciaj Koloroj, regulas jenon: *"Kiam oni hisas aŭ pendumas la nacian flagon vertikale, la krono rotacias kun la celo teni ĝin orientita supren, do en horizontala pozicio rilate la plankon"*.




*Ĉilia kaj Liĥtenŝtejnaj flagoj vertikale pendumitaj laŭ ties naciaj normoj.*

Ĉu ĉi tiuj disponoj, tiu de Ĉilio kaj de Liĥtenŝtejno, povus esti aplikitaj al esperanto-flago? Sendube jes, vertikala E-flago, el ideala vid-punkto, devus rotacii la stelon por montri ĝin al spektanto kiel ĝi aperas en flirtanta flago, tio estas kun unu el la pintoj signata la suban parton de la blanka kvadrato. Tamen, kiel jam dirite, neniu E-flago estis ellaborita nur kun la celo aperi vertikale, do oni devas akcepti ambaŭ eblojn:

A) Esperanto-flago kies blanka kantono kun la stelo aperas supren maldekstre, se vidata de spektanto.

B) Tiu sama flago, kun la stelo rotaciita.

A



B

# Veksilologia kuriozaĵo

## *La ĉemizo de la nacia futbal-selektitaro de Haitio en la Monda Pokalo de 2026*

La ĉemizo de la haitia nacia futbal-teamo dum la ĵus pasinta Mond-pokalo okazigis enorman amaskomunikilan atenton kaj ĝi vekis fascinan historion de frateco inter landoj pere de iliaj naciaj flagoj.




*Futbal-ludisto de la nacia haitia selektitaro kun la oficiala ĉemizo.*

La entrepreno fabrikanta la sportan ĉemizon inkluzivis en la dezajno memorigan grafikaĵon pri la haitia revolucio kaj posta sendependeco komence de la 19-a jarcento. Do, sur la suba parto de la ĉemizo aperis kelkaj siluetoj hisantaj flagon. La ĉemizo estas blu-kolora kaj sur la flago de Haitio aperas koloroj blua, supren, kaj ruĝa, suben.

Kun la celo diferencigi la bluajn kolorojn de la flago kaj de la ĉemizo mem, oni decidis hel-bluigi la flagon presitan sur la ĉemizo, kvankam la rezulto vere aspektis blank-kolora.

Trakuris tiam la versio, ke temis pri eksplicita omaĝo al la flago de Pollando (blanka kaj ruĝa). Historiistoj asertis, ke ligo inter ambaŭ nacioj, vere ekzistas el historia vidpunkto. Tiel, dum la haitia revolucio, Napoleono Bonaparte sendis milojn da polaj soldatoj por subpremi la ribelon en la tiama franca kolonio. Tamen, multaj el tiu soldatoj decidis dizerti el la franca armeo kaj aliĝi al haitiaj trupoj en la lukto por la libereco, post kompreni, ke la sendependeco estis justa lukto, tre simila al tiu, kiu defendis poloj.



*Detalo de la oficiala ĉemizo.*

Kiel historia dankesprimo, unu el la unuaj haitiaj leĝoj donis al tiuj polaj soldatoj la specialan kategorion de "nigruloj", tio igis ke tiuj soldatoj estus konsiderataj plenrajtaj civitanoj kun la samaj privilegioj ol la ceteraj haitiaj civitanoj. Eĉ grupo el ili konstante loĝis en Haitio.



*Kombato en Crête-à-Pierrot de Auguste Raffet, 1839.*

Tamen, FIFA, la Federacio Internacia de Futbalo Asocia, intervenis ĝuste antaŭ la debuto de la haitia futbal-teamo en la konkuro. La organizantoj konsideris, ke la grafikaj detaloj de la ĉemizo havis politikan enhavon, kaj tio malobservus la normojn de tiu futbala tutmonda organizaĵo pri sportaj vestaĵoj Do, oni devigis la haitian teamon ŝanĝi la ĉemizojn lastminute.

Malgraŭ ĉio, la historio de la supozita haitia omaĝo al Pollando disvastiĝis inter futbal-entuziasmuloj, kvankam la entrepreno fabrikanta la sportan ĉemizon fine informis, ke temis reale pri la haitia flago, kvankam iomete klarigita en ties supra strio.



# La angulo de la blazonoj

## *Brunejo*

Kvankam kreita en la jaro 1932, la nuntempa bruneja blazono estis oficiale adopita en 1959. Ĝi aperas meze de la nacia flago. Ekzistas kvin ĉefaj elementoj en la blazono:



- La standardo kaj la reĝa ceremonia ombrelo, simboloj de la sultana povo.
- La flugiloj. Ili reprezentas, en siaj kvar plumoj, la justecon, la trankvilecon, la prosperon kaj la pacon, kiun devas ĝui la sultanlando.
- Kreskanta luno. Ĝi estas la simbolo de la islama religio. Ene de ĝi aperas la ŝtata devizo de Brunejo: *"Ĉiam en servo kun Dia gvido"*.
- Sub ĝi ene de rubando oni povas legi la nomon kaj la celon de la ŝtato, laŭvorte: *"Brunejo loĝejo de Paco"*.
- Flanke aperas du manoj, kiuj memorigas la devon prizorgi la brunejan popolon fare de la Ŝtato.



# KUNVENO

# POR LA LEĜA FONDIĜO DE VENTO

Kiel ĉiuj legantoj sendube scias, de antaŭ kelkaj jaroj unu el la ĉefaj celoj de nia revuo estas kunordigi interesitojn pri veksilologio, kiuj parolas la internacian lingvon. Dum kelkaj jaroj ni planis la okazigon de interretan kunvenon de tiuj, kiuj deziras kunlabori en ĉi tiu projekto. Nu, ni jam havas konkretan daton kaj horon. Do, ni sciigas al vi bazajn informojn pri la kunveno celanta la leĝan fondiĝon de VENTO. Jen ili:

• Dato de la kunveno: 2026.09.06 (jaro.monato.tago).

• Horo de la kunveno: 15:00 (GMT). Tio estas (ekzemple):
- Hispanujo (duoninsulo, Balearoj, Ceŭto kaj Melilo): 17:00.
  Kanaria Insularo: 16:00
- Italujo: 17:00.
- Portugalujo (duoninsulo kaj Madejro): 16:00.
  Acoroj: 15:00.
- Usono (Novjorko): 11:00.
- Brazilo (Braziljo): 12:00.

• Ligilo: https://meet.google.com/egc-qznj-nsc

• Retpoŝtadreso de VENTO: vento@esperanto.ac

En ĉi tiu kunveno, oni pritraktos la laŭleĝigadon de VENTO, kiel la fakan esperanto-asocion pri flagoscienco kaj ankaŭ la unuan estraron de VENTO. Aldone, oni informos pri kelkaj projektoj kaj pri la propono aliĝi al la Internacia Federacio de Flagosciencaj Asocioj (IFFA).

Ĉiuj interesitoj, post kontakto kun la organizantoj, ricevos dosierujon antaŭ la kunveno. Tie, estos eble legi la proponitan statuton de VENTO kaj en la hispana kaj en esperanto. Estas necese memorigi, ke la asocio estos fondita en Hispanujo, lando, kie la plejmulto de la iniciatintoj loĝas, kaj kie estas eldonita la revuo VENTO. Se vi deziras partopreni en la kunveno, aŭ vi havas dubojn aŭ sugestojn, bonvolu kontakti nin en la oficiala retpoŝtadreso:

vento@esperanto.ac




# Flagoj kaj poŝtmarkoj

## *Japana enmigrado en Brazilon*

En la jaro 1988 la Poŝta Servo de Brazilo emisiis specialan poŝmarkon por memorigi la 80-an datrevenon de la japana enmigrado en Brazilon. Ĉi tiu historia evento komenciĝis la 18-an de junio de 1908, kiam la ŝipo *Kasato Maru* alvenis, el la japana urbo Kobeo, en la havenon de San-Paŭlo. Sur ĝi vojaĝis centoj da japanaj enmigrantoj, kun la celo labori en kafo-bienoj.




La aŭtoro de la bildo estis Ivan Wasth Rodrigues. Ene de la poŝtmarko aperas la ŝipo mem flirtigante la japanan flagon. Unuaplane aperas familio de japanaj pioniroj. Kiel afabla detalo, la bildo montras la infanon kun brazila flago por reprezenti la kulturan integriĝon en Brazilo de la japana idaro.

En la jaro 2008 okazis la 100-a datreveno de tiu enmigrado. Nova poŝtmark-emisio estis lanĉita. Ĉi-foje temas pri du poŝtmarkoj, sur unu el ili aperis la ŝipo *Kasato Maru*, kvankam ĉi-foje la japana flago apenaŭ videblas. Sur la dua poŝtmarko aperis la brazila kaj la japana flagoj kaj centre papera gruo, farita per la tradicia japana arto de paperfaldado, ĝi estas simbolo pri longa vivo. Ambaŭ poŝtmarkoj estis dezajnitaj de Adriana Shibata, ido de tiu japana enmigrado en Brazilon. Ambaŭ poŝtmarkoj aperis kune en speciala emisio kaj sur ĝi legeblis la teksto "Jarcento de Japana Enmigrado" en la portugala kaj en la japana lingvoj.




# *Trovu la eraron!*






La *Papera Domo* estas hispana krim-drama televida serio, fama en la tuta mondo. La serio temas pri la rabo de la Hispana Reĝa Monfarejo kaj postaj sezonoj pritraktas la rabon de la Banko de Hispanio. Sur la serio aperas oficialaj konstruaĵoj de la hispana ĉefurbo Madrido. Sur unu el la epizodoj de la tria sezono aperas oficiala konstruo kaj antaŭ ĝi, vico da naciaj flagoj. Unu el ili, tiu de Panamo, ŝajnas esti inverse lokigita.



# Veksilologia Humuro




***La proksima numero de VENTO aperos en la monato decembro 2026.***

*Ĝis la revido okaze de la kunveno por fondi la asocion VENTO, okazonta per interreto la venontan 6-an de septembro, je la 15:00 horo GMT.*



AL LA GEKUNBATALANTOJ

SUB LA VERDA STANDARDO

PROSPERAN KAJ FELIĈAN NOVJARON

BONDEZIRAS

AĤILO TELLINI

UDINE. (S. Roko) - 1an de januaro 1908